

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

Centre Culturel Angevin d'Espéranto
www.esperanto-angers.fr

**ASSEMBLÉE
GÉNÉRALE**
du Centre angevin d'espéranto
samedi 26 février 2011
14h30 - Centre Jean Vilar
à Angers

Quelques mots

Cette Feuille a malheureusement un côté bien triste puisque nous évoquons le décès d'une personnalité marquante de l'histoire et la vie de notre groupe, André Frangeul. Le prochain bulletin réservera une place importante à notre ami et à son action.

Réservez dès à présent le samedi 26 février 2011, nous tiendrons notre assemblée générale qui sera suivie de la traditionnelle galette.

Au nom du Conseil d'Administration, je vous adresse à vous et à votre famille, tous mes vœux de bonheur et de santé.

Pierre Jagueneau, Président

Trésors de notre bibliothèque

L'ŒUVRE IMMENSE DE GASTON WARINGHIEN

Essayiste, traducteur, poète, architecte de l'espéranto d'aujourd'hui.

Prétendre parler de l'œuvre titanesque du professeur Gaston Waringhien en cette courte chronique serait une impossible gageure. Tout au plus pouvons nous citer l'essentiel de ses écrits.

Gaston Waringhien naquit à Lille en 1901 et décéda en 1991, après avoir connu une extraordinaire carrière.

Il obtint sa licence de lettres à 19 ans et l'année suivante, le diplôme d'Etude supérieure en Histoire des religions. A 22 ans, il est agrégé en philologie classique et professeur de latin, grec et français.

L'espéranto l'avait conquis lorsqu'il avait 16 ans et en 1920, il entra en relation avec le Professeur Grosjean-Maupin, futur auteur du «Plena Vortaro» (dictionnaire tout en espéranto) et, un peu plus tard, avec un autre «géant» de l'espéranto, le Hongrois Kalman Kalocsay, avec qui il ne cessa de collaborer.

Professeur au prestigieuse lycée Lakanal, collaborateur du grand Larousse Encyclopédique, membre de l'Académie d'espéranto, Gaston Waringhien fonda en 1934, l'Institut français d'espéranto.

Mobilisé comme officier en 1939, il fut fait prisonnier et c'est dans son camp d'internement qu'il rédigea son ouvrage «ABC de l'espéranto pour ceux qui aiment les lettres» et qu'il acquit la maîtrise de la langue anglaise (il traduisit plus tard des ouvrages importants de l'anglais en français)

Après la guerre, ne cessa de s'allonger la liste des livres de Waringhien qui, simultanément, assura la direction de la revue «Nica literatura revuo» et exerça ses talents de lexicologue pour la publication du «Plena Ilustrita Vortaro» et du «Plena Analiza Gramatiko de Esperanto» (en collaboration avec Kalocsay).

On trouve dans l'œuvre multiforme de Waringhien cinq recueils d'essais concernant l'His-

Suite page 3

Kelkaj vortoj

Tiu Folio, bedaŭrinde, prezentas malĝojan aspekton ĉar ni elvokas la forpason de gravulo, kiu markis la historion kaj la vivon de nia grupo, temas pri André Frangeul. La venonta bulteno plurakontos pri nia amiko kaj lia agado.

Tuj notu sur via agendo tiun daton :

Trezoroj de nia biblioteko

LA GRANDA VERKO DE GASTON WARINGHIEN

Eseisto, tradukisto, poeto, arkitecto de la hodiaŭa esperanto.

Pretendi paroli pri la titana verkaro de Profesoro Gaston Waringhien en tiu mallonga kroniko, estus neebla veto. Maksimume, ni povas citi la plejgravaĵon el liaj skribaĵoj.

Gaston Waringhien naskiĝis en Lille en 1901 kaj mortis en 1991, post



travivo de eksterordinara kariero. Li ricevis sian beletristikan licencion deknaŭjara kaj dum la sekvanta jaro, la diplomon de supera studo pri religia historio. Dudekjara, li estis agregaciulo pri klasika filologio kaj profesoro pri greka, latina kaj franca lingvoj.

Li ekposedis Esperanton, kiam li estis deksejara kaj en 1920, li ekrlatis kun Profesoro Grosjean-Maupin, estonta aŭtoro de «Plena vortaro»

Sabaton la 26-an de februaro 2011. Okazos nia Ĝenerala Kunveno sekvota de la kutima «reĝokuko».

Nome de nia komitato, mi deziras al vi kaj al viaj familianoj, feliĉon kaj bonfarton.

Pierre Jagueneau, Prezidanto

(vortaro tute en esperanto) kaj, iom pli poste, kun alia «giganto» de Esperanto, la hungaro Kálmán Kalocsay, kun kiu li ne ĉesis kunlabori.

Profesoro en la prestiĝa liceo Lakanal, kunlaboranto por la «granda Larousse enciklopedio», membro de la Akademio de Esperanto, Gaston Waringhien fondis en 1934, la francan Instituton de Esperanto.

Mobilizita kiel oficiro en 1939, li estis militkaptito kaj en la internigejo li redaktis sian verkaĵon : «ABC de Esperanto por tiuj kiuj amas beletristikon»; ankaŭ tie, li spertiĝis en la angla lingvo (li poste tradukis gravajn librojn de la angla en la francan).

Post la milito, la listo de la libroj de Waringhien ne ĉesis plilongiĝi : samtempe, li estris la «Nican Literaturan revuon» kaj ekzercis siajn talentojn de leksikologo por la redaktado de «Plena Ilustrita Vortaro» kaj de «Plena Analiza gramatiko de Esperanto» (tiu lasta en kunlaborado kun Kalocsay).

Oni trovas en la multforma verkaro de Waringhien kvin esearojn pri Historio, filozofio, religioj, esperanta kulturo, k.t.p.

En kvar dulingvaj verkoj, kuŝas la traduko en Esperanto de la plejbono el la franca poezio. Aliaj volumoj konigas al ni la poemarojn de José Maria de Heredia, de Gérard de Nerval kaj de Louise Labé.

Waringhien liveras al ni siajn proprajn poemojn en «Duonvoĉe» kaj pruvas siajn kvalitojn de tradukisto en verkoj de Omar Kajam, Boccace, Heine,

Sekvo paĝo 3

Les yaourts Sojasun en espéranto

4 Novembre 2010 - Rennes (France)

L'Institut de langues "LinguaForce" informe :

La grande exposition SIAL (Salon International de l'Agro-alimentaire) a eu lieu près de Paris du 17 au 21 Octobre 2010. Parmi ses plus de cinq mille stands, un des plus grands était celui de "TRIBALLAT" (entreprise familiale bretonne de Noyal-sur-Vilaine). Sur celui-ci, il était possible de voir ensemble avec divers produits et nouveautés un lot de paquets de yaourts "SOJASUN" écrit tout en espéranto. C'était un lot prototype, présenté là comme candidat au prix des nouveautés.

La compagnie "LinguaForce" de Rennes en a réalisé la traduction en espéranto.

Dans un article (numéro 28 de septembre) de la revue professionnelle CFIA, Olivier CLANCHIN, patron de TRIBALLAT, clarifie son intérêt pour l'Espéranto.

Devenir une entreprise européenne... "travailler avec l'Espéranto"

(...) Considérer le lendemain signifie aussi construire une culture européenne. Quand on parle d'une culture européenne, cela concerne aussi la communication... "Nous commençons à croire que l'Espéranto pourrait être un modèle". Quand, après avoir entendu cela, on ironise au sujet de l'Espéranto, le patron amorce un sourire : "Eh bien, là aussi, tout comme pour le Bio et le soja, des gens ont envie d'y croire. Nous avons cru à d'autres projets ... donc l'Espéranto, pourquoi pas ? Cela mérite qu'on essaie. C'est positif de se préparer à relever des défis. "L'entreprise est un bon vecteur pour tester ce concept. Dès lors qu'il y a quelque chose de collectif entre des hommes qui n'utilisent pas la même langue, l'Espéranto peut être un outil cohérent qui se maîtrise dix fois plus vite que l'anglais.

N'oublions pas que l'Europe est un groupement de 27 pays. Si nous avions tous une langue commune, cela accélérerait beaucoup de démarches. En outre, dans la logique de durabilité, là où l'on parle de diminution des emballages, comment faire, avec la présence d'autant de langues que de pays, pour exporter un seul produit ? Quand vous achetez des appareils ménagers, combien de kilogrammes de papier, de manuels, sont utilisés dans toutes les langues ?

L'Espéranto est la seule langue équitable.... car c'est la langue maternelle de personne.(...)"

JOGURTOJ SOJASUN

<http://www.linguaforce.com/wawawoo/esperanto/sial2010.html>

TRIBALLAT

<http://www.triballat.fr/nos-engagements.html>

<http://www.lejournaldesentreprises.com/editions/35/actualite/conjoncture/esperanto-le-pari-fou-de-triballat-06-03-2009-63090.php>

L'ASSOCIATION ENTREPRISE ESPÉRANTO

http://www.bretagne-international.com/_fr/_5_En-Bretagne/1-Entreprise/actu.php?id_article=541&cible=1&lang=fr&localisation=5

Sojasun-jogurtoj en Esperanto

4an de novembro 2010

RENNES - FRANCIO

Informas LinguaForce :

La profesia ekspoziciego SIAL okazis apud Parizo inter la 17a kaj la 21a de oktobro 2010. Inter ties pli ol kvinmilo budoj, unu el la grandaj estis tiu de Triballat. Sur tiu ĉi, kune kun diversaj produktoj kaj novaĵoj, videblis pakaĵo de la jogurtoj Sojasun



tute en Esperanto ! Ĝi estis prototipo tie prezentata estante kandidato por novigpremio. Esperantigis ĝin la kompanio LinguaForce en Rennes. En artikolo de la septembra numero (28) de la profesia revuo CFIA, Olivier Clanchin, estro de Triballat, klarigas sian intereson por Esperanto.



Eŭropiĝi por entrepreno... "labori kun Esperanto"

Titolo en Esperanto en la franclingva fonta teksto, kiu legeblas ĉi tie :

<http://www.cfiaexpo.com/infos-marche/triballat.html> (...) Konsideri la morgaŭon signifas ankaŭ konstrui eŭropan kulturon. Kiam oni parolas pri "eŭropa kulturo" ankaŭ

temas pri komunikado... "Ni ekopiniis ke Esperanto povus esti modelo". Kiam, aŭdinte tion, oni ironias pri Esperanto, la estro ekridetas : "Nu, ankaŭ ĉikaze, same kiel por 'Bio' kaj sojo, ekzistas homoj kiuj deziras kredi en ĝi. Ni kredis en la aliaj projektoj... do Esperanto, kial ne? Tio indas, do oni provu. Estas pozitive preti sukcesigi defiojn!"

La entrepreno estas bona vektoro por testi tiun koncepton. Ekde kiam estas io kolektiva kun homoj kiuj ne uzas saman lingvon, Esperanto povas esti kohera ilo, kiu regatas dekfoje pli rapide ol la angla. "Ni ne forgesu ke ni estas Eŭropo 27-opa. Se ni ĉiuj havus komunan lingvon, tio plirapidigus multajn demarŝojn. Krome, en la logiko de daŭripovo, tie kie oni parolas pri malpligrandigo de pakaĵoj, kiel fari per tiom da lingvoj kiom da landoj kiam oni volas eksporti unusolan produkton? Kiam vi aĉetas hejmajn aparatojn, kiom da kilogramoj da papero estas, da manlibroj, en ĉiuj lingvoj? Esperanto estas la sola justa lingvo... ĉar neniu naskiĝas kun ĝi. (...)"

Nathalie Dubrulle au Brésil

EXTRAITS DE SON RÉCIT DE VOYAGE

d'après sa conférence-diaporama à Maillet (Indre) le 22/10/2010

Un maire «formidablement enchanté» nous accueille. D'emblée, il qualifie d'exceptionnel le parcours de cette jeune femme qui est partie à l'aventure, après avoir d'abord appris la langue internationale Espéranto. En effet, Nathalie est partie 5 mois au Brésil, du 16 mars au 16 août 2010, seule avec ses 3 jeunes enfants. Le papa l'a cependant



rejoint au milieu du voyage mais pour 1 mois seulement.

Pour entendre un peu d'espéranto, avant le récit que Nathalie fit en français devant le public francophone qui remplissait la salle, la petite Noémie, 8 ans, a été d'accord pour se présenter en utilisant la langue internationale. Et c'est toujours en espéranto que Noémie a présenté ensuite :

- son frère, Zachari, 5 ans

seulement (qui fera allègrement de longues marches - voire une de six heures, réputée impossible à cet âge selon l'office du tourisme local)

- sa sœur, Salomé, 11 ans.

Arrivée par avion à Rio, Nathalie a ensuite voyagé grâce au réseau espérantophone, en utilisant le réseau d'hébergement «Pasporta Servo» dans lequel sont répertoriés tous les espérantophones qui veulent bien en accueillir d'autres. Elle a aussi utilisé le Jarlibro où sont inscrits tous les délégués de l'association mondiale d'Espéranto. Cela lui a permis de vivre avec les gens du pays, de faire leurs activités, de rencontrer leurs amis. Elle signale d'ailleurs un accueil partout vraiment exceptionnel.

LE BRÉSIL :

Un pays 16 fois plus grand que la France, 4310 km du Nord au Sud - 4396 km d'Est en Ouest 191 millions d'habitants dont 83% de population urbaine.

On y retrouve de nombreuses nationalités. Colonie portugaise, le Brésil a subi beaucoup de brassages avec les Indiens et a été confronté à l'esclavage et au mélange avec les Africains.

Son drapeau :

- le vert symbolise la forêt amazonienne
- le jaune symbolise les réserves aurifères
- le bleu, celui du ciel
- les étoiles représentent les 27 états

Suite de l'article dans votre prochain numéro



Trezoroj de nia biblioteko (sekvo de la paĝo 1)

toire, la philosophie, les religions, la culture de l'espéranto, etc... En quatre ouvrages bilingues on apprécie la traduction en espéranto du meilleur de la poésie française.

D'autres livres nous introduisent dans les poèmes de José Maria de Heredia, de Gérard de Nerval et de Louise Labé.

Waringhien dévoile ses propres poèmes dans «Duonvoĉe» et ses talents de traducteur dans des œuvres d'Omar Kajam, Boccace, Heine, Baudelaire... outre ses traductions de chansons françaises.

Signalons encore les poèmes érotiques du «Libro de Amo» avec la complicité de Kalocsay. Les espérantophones peuvent être fiers d'avoir compté dans leurs rangs un homme d'une telle qualité.

Puisse la lecture des livres de Waringhien, les

inspirer pour continuer leurs combats pour la promotion et la reconnaissance de l'espéranto.

André FRANGEUL

(écrit de sa main quelques semaines avant sa mort)

NB : C'est dans le petit cimetière d'Aigné, commune située à 10 km au N-O du Mans, que Gaston Waringhien est inhumé avec son épouse.

Une rue d'Aigné et la bibliothèque portent son nom depuis l'année 2001.

Baudelaire... krom siaj tradukoj de francaj kanzonoj. Ni citu plie la erotikajn poemojn de «Libro de Amo»... kun la komplikeco de Kalocsay.

La esperantistoj povas fieri havis inter si homon de tia kvalito. Espereble, la legado de la libroj de Waringhien inspiras ilin por daŭrigi siajn batalojn por la promocio kaj rekono de Esperanto.

André FRANGEUL

(mane skribita kelkajn semajnojn antaŭ sia morto)

NB : Gaston Waringhien estis entombigita kun sia edzino en la eta tombejo de Aigné, urbeto situanta 10 km nordokcidente de Le Mans.

Aŭskultu Esperantistajn radiojn !

Por informi vin, trejni vian Esperanton, malkovri aliajn kulturojn, plezurigi vin, jen kelkaj retadreso:

Radio Varsovie

<http://www2.polskieradio.pl/eo/>

Ĉina Radio Internacia

<http://esperanto.cri.cn/>

Radio 3zzz - Australie

<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Radio Vatikana

<http://www.radio-vatikana-esperanto.org/>

Radio Havano Kubo

<http://www.ameriko.org/radiokubo/>

Radio Esperanto - Kaliningrad

<http://la-ondo.rpod.ru/>

Parolu Mondo - Brésil

<http://parolumondo.com/>

Radio Verda - Vancouver

<http://radioverda.com/>

Arkivoj

<http://www.radioarkivo.org/>



Nouvelles du monde

Novajoj el la mondo

On peut lire chaque mois, sur Internet, un choix d'articles en espéranto du journal Le Monde Diplomatique. Ces articles sont traduits en 28 langues dont l'espéranto. (<http://eo.mondediplo.com/>)

200 participants du cours internet d'espéranto Lermu! se sont réunis en Slovaquie, en juillet. Le programme comprenait des cours de plusieurs niveaux et des activités de vacances.

Un industriel japonais, M. Etsuo Miyoshi a réservé deux pages d'information sur l'espéranto dans le Monde du 15 décembre dernier. Les lecteurs sont invités à exprimer leur opinion sur ces pages au Courrier des lecteurs du Monde.

Des nouveaux livres : vient de paraître la traduction d'un ouvrage du célèbre linguiste américain A.N. Chomsky sous le titre «Lingvo kaj menso» (langue et intellect). Ce livre est disponible dans notre bibliothèque.

La traduction en espéranto du «Petit Prince» de Saint-Exupéry, qui était épuisée, vient d'être rééditée. Des exemplaires sont disponibles auprès de votre groupe préféré !

Vient d'être réalisée une luxueuse traduction en deux volumes du «Comte de Monte-Cristo», d'Alexandre Dumas.

La fédération bretonne d'espéranto a publié en trois langues (espéranto, chinois et français) «Anecdotes sur Confucius». Traducteurs : Liu Xiaojun et J. P. Ducloyer.

Les éditions Sezonoj, de Kaliningrad, ont publié sous le titre «La Sekreta Miraklo» (le Miracle secret), un recueil de nouvelles du grand écrivain argentin Jorge Luis Borges.

Sous le titre «Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj» (Pour que les jours de l'humanité soient plus lumineux) est paru un recueil des écrits de Lidia Zamenhof. Cette fille de l'initiateur de l'espéranto avait dirigé des cours d'espéranto en de nombreux pays. Elle avait adopté la religion Bahá'í et fut assassinée par les nazis au camp de concentration de Treblinka, avec sa soeur Sofia.

Au SIAL 2010 (Salon International des professionnels de l'Agroalimentaire) à Paris, on a pu voir un produit nommé «Sojasun» avec une mention en espéranto «sen aldonaĵoj» (sans additifs) bien en évidence.

Dans un article (Les deux bouts de la langue) publié en tribune libre dans «Le monde» du 11 juillet 2010, le philosophe Michel Onfray a dit du bien de l'espéranto, mais du mal des langues régionales. L'article a été longuement commenté.

Une catastrophe est arrivée au Centre Bona Espero (Brésil). Cette exploitation agricole, qui sert surtout d'école à des enfants, a brûlé mi-septembre. Pendant 17 heures, les «Bonesperanoj» ont lutté et ont réussi à sauver les maisons et les plantations de la ferme. Des kilomètres de clôture et plusieurs maisons (à l'extérieur) ont brûlé mais tous les habitants sont saufs.

Il est important que personne ne soit mort et que les blessures guérissent. L'eau arrive de nouveau, l'électricité fonctionne, le téléphone seulement un peu mais l'école continue. http://fr.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero
<http://esperanto.over-blog.net/article-incendie-au-centre-de-bona-espero-57555423.html>

Ĉiunonate, pere de Interreto, oni povas legi artikolojn de la monata gazeto Monde diplomatique en Esperanto. Fakte, la enhavo de la gazeto estas parte tradukita en 28 lingvojn, inkluzive de Esperanto. (<http://eo.mondediplo.com/>)

200 partoprenantoj de la interreta Esperanto-kurso Lermu! kunvenis en Slovakio en julio. La programo entenis plurnivelajn kursojn kaj liber-tempajn aktivaĵojn.

Japana industriisto, S-ro Etsuo Miyoshi, rezervis du paĝojn pri Esperanto en la ĵurnalo Le Monde de la pasinta 15-a de decembro. La legantoj estas invitataj esprimi sian opinion pri la enhavo de tiuj paĝoj, skribante al la ĵurnalo Le Monde.

Novaj libroj : lasttempe aperis traduko de libro de la fama usona lingvisto A.N. Chomsky sub la titolo «Lingvo kaj menso». Tiu libro disponeblas en nia biblioteko.

La tradukaĵo de «La Eta Princo» de Saint-Exupéry, kiu estis elĉerpita en Esperanto estis ĵus reeldonita. Ekzempleroj disponeblas ĉe via preferata grupo !

Aperis ankaŭ luksa traduko, en du volumoj, de «La Grafo de Monte-Kristo», de Aleksandro Dumas.

La bretona Esperanto-federacio publikigis «Rakontoj pri Konfuceo» en Esperanto, franca kaj ĉina lingvoj, tradukoj de Liu Xiaojun kaj J. P. Ducloyer.

La eldonentrepreno Sezonoj, el Kaliningrado, publikigis, sub la titolo «La Sekreta Miraklo», novelojn de la fama argentina verkisto Jorge Luis Borges.

Sub la titolo «Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj» aperis la originala verkaro de Lidia Zamenhof. Tiu filino de la kreinto de Esperanto, gvidis Esperanto-kursojn en multaj landoj. Ŝi adoptis la bahaan religion kaj estis mortigita de la nazioj en la koncentrejo de Treblinka, kun sia fratino Sofia.

En SIAL 2010 (Internacia Foiro por agronutraĵoj profesiaj) en Parizo, oni povis rimarki varon nomitan «Sojasun» kun esperanta skribaĵo «sen aldonaĵoj» tre legebla.

En artikolo (Les deux bouts de la langue - ambaŭ finoj de la lingvo/lango) eldonita en libera tribuno de la ĵurnalo «Le Monde» la 11-an de julio 2010, la filozofo Michel Onfray favore parolis pri Esperanto sed malfavore pri la regionaj lingvoj de Francio. La artikolo estis multe komentita.

Okazis katastrofo en Bona Espero en Brazilo. Tiu farmbieno en kiu laboras kaj instruigas infanoj brulis meze de septembro.

Dum 17 horoj la Bonesperanoj batalis kaj sukcesis savi la domojn kaj plantaĵojn. Brulis kelkaj kilometroj da barilofostoj, pluraj domoj, sed homoj ĉiuj saviĝis.

Sed gravas, ke la vundoj pliboniĝas kaj neniu mortis. Do, ĉio bone kaj baldaŭ venos la printempaj pluvoj.

Jam denove la akvo fluas, la elektro restariĝis, la telefono nur iomete, sed la lernejo funkcias. http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero
<http://esperantomovado.blogspot.com/2010/10/fostoj-post-la-fajro-en-bona-espero.html>

Pasintaj eventoj



Pacotago en Angers la 21-an de septembro 2010

La dimanĉon 26-an de septembro 2010, kvartala animado en St.Serge, Angers, pri la paco



la 16-an de septembro 2010 en Angers, nia sekretario Laurent Vignaud prezentas Mireille Grosjean antaŭ ŝia konferenco pri la paco



Neforgesebla koncerto far Jomo organizita en Changé la 12-an de novembro 2010 de la sarta Esperantista grupo



Granda amiko malaperis

André Frangeul s'en est allé quelques mois après avoir fêté ses 90 ans. Nul doute qu'il laissera un grand vide au sein de notre groupe.

Voici l'allocution prononcée par Pierre Jagueneau aux obsèques d'André :

*«Bonjour Monsieur Espéranto !
 C'est par cette formule étrange qu'un sénateur de notre département avait coutume de saluer notre ami André.*

L'espéranto, voilà la tâche à laquelle André s'était attelée il y a 66 ans puisqu'en 1944 il participa à la reconstitution du groupe.

Depuis, il a toujours été là, assurant le secrétariat ou la présidence de notre groupe, donnant des cours aux petits comme aux grands, je veux dire, aux débutants comme aux confirmés, adorant se faire interviewer par un journal local mais tempêtant lorsque le même journal ne passait pas ses communiqués ou pire, les passait mais tronqués et avec des fautes !

Là, son sang d'ancien correcteur ne faisait qu'un tour !

Mais André, c'était aussi la connaissance, c'était celui qui outre la profonde connaissance de la langue, des langues, plutôt, le français, bien sûr, et l'espéranto, savait nous raconter la vie de tel ou tel écrivain ; s'enthousiasmant sur le dernier livre reçu et nous faisant partager la fabuleuse bibliothèque dont il avait la garde.

Pensez-donc, plus de 2000 volumes, comme il aimait l'annoncer fièrement à ses visiteurs. Et je le soupçonne de les avoir tous lus.

Voilà, André, nous parlons déjà de toi et nous continuerons, comme nous continuerons à enseigner à nos élèves cette langue merveilleuse que tu nous as apprise, nous TES élèves.

Tu seras l'absent excusé de nos réunions mais toujours présent dans notre coeur et nos pensées.

Ĝis la revido, André».



André Frangeul

Vous informer

www.esperanto-angers.fr

www.esperanto-france.org
www.esperanto-jeunes.org

www.uea.org
www.esperanto.net

Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers - Tél. 02 41 73 17 97
 Courriel : info@esperanto-angers.fr

Memorindaj datoj

26. FEBRUARO 2011

Ĝenerala kunveno
 de Anĝeva Esperantista Centro
 14h30 - Centre Jean Vilar - Angers

22 - 26. APRILO 2011

Interasocia Renkontiĝo de Esperanto
 ĉe Mediteraneo en Seto, Francio

Kunorganizita de SAT-Amikaro,
 Espéranto-France, kaj pluraj societoj.
 Inf. : LOKO, 13bis rue Haute FR-30310-Vergèze,
 Francio. Rete: info@esperantosete2011.fr



23 - 30. JULIO 2011

96-a Universala Kongreso de Esperanto,
 UK en Kopenhago

Danio. Inf.: Universala Esperanto-Asocio,
 Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,
 Nederlando. Rete: kongresoj@co.uea.org
 Tel.: +31 (0)10 436 1044
 Fakso: +31 (0)10 436 1751

30. JULIO - 6. AŬGUSTO 2011

4-a INA-Konferenco

La signifo de naturkuracado en la nuna mondo
 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo,
 Germanio. INA festos sian 25-jaran jubileon.
 Prelegoj pri naturkuracado, praktikaj spertoj.
 Inf.: Internacia Naturkuraca Asocio (INA), Harald
 Schicke, Hauptstr. 38, DE-37412 Herzberg am
 Harz, Germanio. Rete: info@ginseng-laden.de

30. JULIO - 6. AŬGUSTO 2011

84-a SAT-Kongreso
 en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino

Inf.: 84-a SAT-Kongreso, Kralja Tvrtka 19,
 Ba-71000 Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino.
 Rete: satkongreso@esperanto.ba
 Tel/fakso: +387-33-205487

8 - 15. AŬGUSTO 2011

FESTO en Grezjono-Kastelo, Francio

En la kastelo de Grezjono okazos FESTO,
 junulara renkontiĝo ĉiujara de la franca
 Esperanto-junularo. Koncertoj ĉiutagaj
 organiziĝas de Vinilkosmo, la tuta etoso
 iĝas neforgesebla. Tuta semajno etos-plena,
 muzika kaj amika. Inf.: JEFO, 18, rue de
 la doucetièrre, Fr-50180 Agneaux, Francio.
 Rete: bjo.kac@gmail.com

La date à retenir :

SAMEDI 26 FÉVRIER 2011

Assemblée générale
 du Centre angevin d'espéranto
 14h30 - Centre Jean Vilar - Angers